Arta Ateliero: Simplaj Floroj
prezentos Leston Buell
21an de majo 2022
dum la jarkunveno de Esperanto Nederland

Jam dum kelkaj jaroj, Leston Buell, Usonano loĝanta en Amsterdamo, faras desegnojn precipe uzante nigran inkon kaj akvofarbajn krajonojn. Inter liaj desegnobjektoj estas veraj personaj, karikaturaj kaj bestaj personaĵoj kaj floroj. Jen kelkaj el liaj lastatempaj desegnaĵoj.

Dum la jarkunveno de Esperanto Nederland, Leston gvidos artan atelieron por maksimume 20 personoj. Vi ne nepre devas havi sperton pri desegnado aŭ kolorigado por partopreni. Dum la ateliero, vi faros belan, multkoloran poŝtkarton kun simpla desegno de floroj sekvante trietapan metodon: Unue, ni skizos diversformajn florojn kaj foliojn per grafita krajono, poste preparos finan desegnon per inka skribilo kaj finfine kolorigos la desegnon uzante akvofarbojn krajonojn. Tiuj krajonoj similas al la plej ĝenerale konataj koloraj krajonoj, sed ilia kerno konsistas el akvofarbo. Por aktivigi (solvi) tiujn farbojn, ni uzos skribilforman penikon, kiu enhavas propran akvujeton. La prezentanto provizos ĉiujn materialojn, kaj ĉiu partoprenanto faros finitan verkon. Jen du ekzemploj de la tipo de kartoj kiujn ni produktos dum la ateliero.